

# O BRASIL ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.  
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 37-38 (296-297)

Janeiro-Fevereiro 1941

Redator responsavel:  
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:  
Praça da República, 54.  
Rio-de-Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.  
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15  
respondkuponoj.

## DUA BRAZILA KUNVENO DE INĜENIEROJ

C A X A M B Ū

FAMA KURACURBO EN ŜTATO MINAS GERAIS

La Dua Kunveno de Inĝenieroj, antaŭ nelonge efektiviĝinta en São Paulo, ĉefurbo de samnoma Ŝtato, aprobis la jenajn konkludojn verkitajn de la Komisiono, kiu raportis la tezon rilatan al la Temo VII — La problemoj pri la unuiĝo de la teknika terminaro en Brazilo. Kiel ĝin solvi? — La Dua Kunveno de Inĝenieroj voĉdonas, por ke:

1. estu de nun komencata la organizo de fiksa teknika terminaro sama por la tuta lando.

2. estu komisiata organo, je nacia karaktero kaj daŭra funkciado (Sekretariejo de la Federacio de Inĝenieroj, Aroj de la Naciaj Laboratorioj pri Provo aŭ alia laŭregule pretigita estaĵo) por:

a) kunordigi kaj stimuli la studojn de ĉiuj interesatoj pri tiu afero (inĝenieroj, asocioj, lernejoj, entreprenoj, kc.);

3. ĉe la elekto de la teknikaj terminoj estu:

a) aldonataj la tradukoj en la franca, angla, germana, hispana, itala kaj esperanta lingvoj (kun la citado de l' termino uzata en Portugalujo, se ĝi estas malsama al la akceptita por Brazilo).

(subskribitaj: Paulo Sá (prezidanto)  
Aristoteles Alvim (raportinto).



Banloko, ĉe la Parko de l'Akvoj (Vidu la tekston sur la dua paĝo)

### 2.<sup>a</sup> CONVENÇÃO BRASILEIRA DE ENGENHEIROS

A 2<sup>a</sup> Convenção de Engenheiros, há pouco realizada em S. Paulo, aprovou as seguintes conclusões elaboradas pela comissão que relatou a tese referente ao Tema VII — O problema da unificação da terminologia técnica no Brasil. Como resolvê-lo? — A 2<sup>a</sup> Convenção de Engenheiros faz votos para que:

1. seja desde já iniciada a organização de uma terminologia técnica uniforme para todo o país.

2. seja encarregado um órgão, de caráter nacional e de funcionamento permanente (Secretariado da Federação de Engenheiros, Reuniões dos

Laboratórios Nacionais de Ensaio ou outra entidade devidamente aparelhada) para:

a) coordenar e estimular os estudos de todos os interessados no assunto (engenheiros, associações, escolas, empresas, etc.);

3. na escolha dos termos técnicos seja:

a) incluída a tradução em francês, inglês, alemão, espanhol, italiano e esperanto (com a citação do termo usado em Portugal, caso seja diverso do adotado para o Brasil).

(assinados:) Paulo Sá (Presidente)  
Aristoteles Alvim (Relator).

**A L V O K O**

Mi petas, ke ĉiuj estraranoj kaj komitatanoj de IEL, kiel ankaŭ la ĉefdelegitoj kaj aliaj gvidantoj, de tempo al tempo sendu al la subskribinto (laŭ adreso: Heleneborgsgatan 6, Stockholm) esperanto-informojn kaj personajn novaĵojn. Estas memkompreneble, ke eĉ nura vivsigno en formo de poŝtkarto estas tre bonvena en tiu ĉi tempo, kiam la morto ludas hazardon pri la sorto de ĉiu aparta homo.

Samtempe mi per tio ĉi informas la membrojn de IEL, ke mi — kiel elektita vicprezidanto de IEL — en la nunaj cirkonstancoj provizore funkcias kiel gvidanto de IEL. Se mia agadlibereco pro militatako al Svedlando estos katenita, mi transdonas la gvidadon de IEL al la komitatano H. W. Hetzel, Philadelphia, Usono.

La tempoj ĉiam estas necertaj, la vivo de la homo estas mallonga, sed eterne brilos la stelo de la espero kaj la sopiro al feliĉo. Vivu la sankta flamo de la idealismo.

Sindone kaj amike via  
*E. Malmgren.*  
Vicprezidanto de IEL.

**ESPERANTO-SEMAJNO**

(De la 20a ĝis la 26a de Aprilo 1941a)

De la "Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko" ni ricevis leteron, el kiu ni publikigas malsupre la jenajn pecojn:

"La Estraro de la Esperanto Association of North America starigis la semajnon de la 20a ĝis la 26a de aprilo 1941 kiel "Esperanto Week" (Esperanto-semajno). Oni faris ĝin pro la jenaj kialoj:

1a. Ĉiu loka societo estas petata dum Esperanto-Semajno okazigi grandan publikan kunvenon, kiun oni vaste reklamos. Ĉe la kunveno oni faros teatraĵojn, muzikaĵojn kaj sufiĉajn propagandajn paroletajn por informi la ĉeestantojn pri la granda bezono por internacia lingvo kaj kiel ideale Esperanto plenumas tiun bezonon.

2a. En urbetoj, kie ne estas loka Esperanto-societo, ĉiu Esperantisto estas petata fari ĉion eblan por reklami Esperanton al ĉiuj, speciale ĝis kaj dum tiu semajno.

3a. Ĉi tiu komitato (la Propaganda Komitato de EANA) eldonas afiŝojn kaj skribos leteron al la libraristo de la publika libraĵejo en preskaŭ ĉiu urbeto en Usono, enmetanta afiŝon kaj petanta

**C A X A M B Ū**

La tempodaŭro, kiun la teknika asistantato de la Nacia Konsilantaro de Geografio, Virgilio Correia Filho, pasigis en Caxambú (Kaŝanbu'), donis al li taŭgan okazon studi la kondiĉojn, ĉe kiuj estiĝis la evoluado de tiu ĉarma urbo, kiu ŝuldas la ĝuatan kontentigan famon al siaj mineralaj akvoj.

Ĝia nomo devenas de la Monteto, kies arkeozoika formiĝo estas sama al tiu de la Montaro Mantiqueira, kiu elstarigas meze de la najbarajo, kaj al kiu oni aldonis tiun loknomon, ekde la unuaj eniroj de la "bandeirantes" el S. Paulo tra valo de Rio Verde (Verda Rivero), survoje al la orminejoj, en la komenco de la 18a jarcento.

Ĉe la bordo de tiu rivero kaj de ties alfluaĵoj stabliĝis plugistoj, kiuj sin proponis provizi la vojaĝantojn per nutraĵoj.

Post nelonge plidensiĝis la loĝantaro de Baependi fariĝinta paroĥo en 1752, kiu ampleksis la monteton Caxambú kaj najbarajn lokojn, inkluzive la marĉan valon Bengo, kie poste oni trovis la riĉajn fontojn. La daton, en kiu ili estis trovitaj, neniu scias certece diri.

Kvankam kelkaj esploristoj ĝin malantaŭenigas ĝis la unua jardeko aŭ la komenco de la dua jardeko de la 19a jarcento, oni nur konstatis, ke en 1841 uzadis tiujn kuracajn akvojn la lepruloj tie kampaditaj kaj, pli poste, forigitaj laŭ juĝa ordono.

Post kelkaj jaroj Oliveira Mafra, helpita de monferintoj el Baependi, fiksas la plej atingeblajn fontojn kaj ilin dotis per protektantaj konstruaĵoj, por ke ili fariĝu utiligeblaj.

Sed pli vasta profito rezultis el la vizito de ŝia Princa Moŝto D. Isabel, akompanata de ŝia edzo, Gastão de

lin publike elmontri ĝin en elstaranta loko.

.....  
Ĉu via asocio, do, afable proklamos la semajnon de la 20a ĝis la 26a de april 1941 kiel "Esperanto-semajno" en via lando kaj instigos ĉiun socion kaj ĉiun personan anon fari eblan ĉion festeni tiun semajnon?"  
.....

Kvankam estas malfacile, precipe en la nuna monda krizo, organizi propagandajn festetojn dum unu semajno, la estraro de BLE pensas, ke oni povas organizi almenaŭ unu aŭ du propagandajn kunvenojn, per kiu oni festos la "Esperanto-semajnon".

Orleans, Grafo d'Eu, dum la jaro 1868.

Diversaj plibonigoj estas faritaj, krom la kvanteca analizo de la akvoj, el kiu rezultis ĝia luigo al Entrepreno, kiu komencis ĝian espluaton.

Ĝia ekposedo farita de la registaro, en 1904, permesis la kreadon de loka magistrato, en la fino de tiujara Decembro.

Kaj ekde tiu epoko Caxambú kreskigadis siajn urbajn servojn pri akvo, lumo kaj kloakoj, por ke ĝi povu respondi al la titolo urbo, akirita en 1915.

Samtempe la luinta Entrepreno, kiu esploras la Akvoparkon, kie ŝprucas la fontoj D. Leopoldina, D. Isabel, Grafo d'Eu, Duko de Saxe, Viotti, Mayrink kaj aliaj profitotaj, zorgis pri ĝia plibonigo pere de la drenado kaj taŭga arboplantado, kiu sanigis la valon Bengo, antaŭe marĉan, kaj plibonigis ĝiajn bordojn per ornamaj plantoj kaj belegaj ĝardenoj.

Per la kunigitaj klopodoj de la ŝtata Registaro, de la Komunumo kaj de la luinta Entrepreno profitadis Caxambú, kiu prezentigas kiel progresanta urbo, kun siaj ĉefaj stratoj bone pavimitaj, siaj modernaj konstruaĵoj, precipe de hoteloj, kaj servitaj per fervojoj kaj ŝoseoj, kiuj permesas rapidan interligon kun la najbaraj komunumoj, kaj ankaŭ kun la tri plej proksimaj ĉefurboj, nome, Rio-de-Janeiro, S. Paulo kaj Belo Horizonte.

Tamen ĝia plej granda merito rezultas el la boneco de ĝiaj akvoj, pri kiuj specialisto diris jene: "Ili havas grandan eŭpepsian valoron, estas multe pli urinigaĵ ol la plej bonaj eŭropaj akvoj, kaj la apetita sensacio estas sekvo de la bonega digestado de tiuj akvoj.

Agante kiel la plej efikaj el la mineralaj akvoj, pro siaj karakterizaĵoj, la fonto D. Pedro surprizigas la diurezon. Ĝi estas la Nacia Evian".

Kaj tiel la kreskiĝo de Caxambú daŭras kiel fama stacio de mineralaj akvoj, al kies fontoj periode alfluas kreskanta klientaro.

(Resumo de la artikolo de S-ro Inĝ, Virgilio Correia Filho, teknika asistanto de la Nacia Konsilantaro de Geografio, aperinta sur ties oficiala organo "Brazila Revuo de Geografio".)

**"O Brasil Esperantista" petas al la estraroj de l' brazilaj kluboj kaj al la brazilaj delegitoj de I. E. L., ke ili sendu monatan raporton pri siaj propagandaj kaj instruaj laboroj.**

# La Mondo Esperantista Funebras

Lidja Zamenhof mortis

"Kion havis mi plej karan —  
La junecon — mi ploranta  
Metis mem sur la altaron  
De la devo ordonanta!"

L. L. Zamenhof.

Simile al ŝia glora patro, Lidja Zamenhof ne havis la gajecon senpripensan de la juna aĝo. Ŝi naskiĝis en la 29a de Januaro 1904, kiel lasta infano de gesinjoroj Zamenhof, kaj lernis Esperanton kiam ŝi estis naŭjara knabino. De tiam ŝi vigle partoprenas en la laborado por la venko de nia lingvo. Ŝia stilo en la lingvo estas flua, natura, ĉarma, kvazaŭ Esperanto estus ŝia nacia lingvo.

En 1933 estis eldonita la libro "Enciklopedio de Esperanto". Ŝi estis tiam 29-jara junulino kaj jam estis eldoninta originalan verkon — "Homo, Dio, Profeto" — kaj brilajn tradukojn de grandampleksaj libroj, kiaj estas "Quo Vadis?", de Sienkiewicz, "Iridiono", de Krasinski, "Baha' u'lah kaj la Nova Epoko" kaj "Parizaj Paroladoj de Abdul Baha", de Esslemont, noveloj de Prus k. a.

Ŝi partoprenis en ĉiuj Universalaj Kongresoj de Esperanto de post 1924, ŝi estis sekretariino de la Esperanta Societo "Konkordo", ŝi estis instruistino laŭ la Cseh-metodo kaj travojaĝis diversajn landojn propagandante kaj instruante laŭ tiu metodo; ŝi vojaĝis tra Usono kaj revigligis tie la movadon; ŝi kunlaboradis en diversaj gazetoj. Ŝi estis advokatinino el la Jura Fakultato de la Varsovia Universitato.

Laŭ artikolo de la Redakcio de "Correio da Manhã", de la 4-1-41, kiun ni sube transkribas, tiu brava, brila, genia doktorino mortis en malliberejo. Ŝi tro amis sian Patrolandon por resti libera en la momento kiam la Patrujo falis en la manojn de l' malamikoj. Same kiel aliaj eminentaj polaj patriotoj, ŝi estis enkarcerigita kaj mortis en malliberejo.

Kvankam ni ne subskribas la pesimistan ĉefpenson de "Correio da Manhã", ĉar ni kredas je la ekzisto de bonuloj, ni transskribas ĝian brilan artikolon. Jen ĝi estas:

## "UNU EL LA VIKTIMOJ

"Aperis iam homo, kiu kredis, ke li povis kunlabori por la bono de la homaro, uzante por tia celo sian grandan kulturon kiel filologo kaj poligloto. Li opiniis kun iom da praveco, ke se la



Lidja Zamenhof

popoloj de sur la tero povus pli bone sin interkompreni, ili pli bone alproksimiĝus unuj de la aliaj, kondiĉe ke ili povus senpene interŝanĝi ideojn per komuna lingvo facila, komprenebla, esprimoriĉa, per kiu ili nuligus la konfuzon de la Babela Turo — unu el la malbenoj postlasitaj al la homo pro lia tro granda ambicio. Tiu revulo estis nomata sur la tero Lazaro-Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kiu varbis adeptojn kaj estas faranta rimarkindajn servojn al la interkomunikigoj, kvankam ĝi ne tute plene atingis la celon deziratan, ĉar tia ne estas la intereso de tiuj homoj, kiuj ĉiam vivadas el la miskomprenoj inter la nacioj. Malgraŭ ĉio, la espersinto lasis sian nomon envolvita en tre meritplena gloro kaj tre prave estis enskribita en la rango de tiuj, "kiuj ne pasis tra la vivo en blanka nubo" (1).

Kiel filologo, konvinkita ke la gramatika difino de la vorto kiel manifestiĝo de la penso estas tute prava, li ne povis kredi, ke la vero estas en la cinika frazo de Talleyrand (2). Sed efektive, same antaŭ kiel dum kaj post la epoko de la fama franca Ŝtatisto, en la antikvaj pretekstoj tiel same kiel en la nuntempaj, en la intrigoj de l' pratempo aŭ en la telegramo de Ems, aŭ en la nuntempaj "protektaj invadoj de landoj", oni ne uzadas la vorton por alia celo ol por kaŝi la penson.

En tia medio, kiu neniam ŝanĝiĝis,

Zamenhof ne povis vidi la triumfon de sia ideo. Mortinte, li lasis la mondon ĉiam en agitado, ĉiam sen interkompreno. La militoj sekvis unu alian kaj li ne konstatis la finon de la antaŭlasta, kiu el la servuteco reaperigis lian Pollandon, nek — memkompreneble — la nunan, kiu refaligis ĝin dumtempe en la manojn de l' antikvaj sklavigintoj.

Li lasis sur nia planedo Esperanton, kaj por helpi ĝian disvastigon, Fraŭlinon Lidja Zamenhof. La idiomado daŭre rompadas malhelpaĵojn. La filino, neniu scias pro kiu alia krimo krom esti polino, posedi kulturon kaj deveni de eminenta patro, mortis antaŭ kelkaj tagoj, kiel viktimo de suferoj kaj malsato, en malliberejo destinita al krimuloj, en la glora kaj martira urbo Varsovio".

Tiele raportis "Correio da Manhã" pri la morto de tiu anĝela junulino, kies memoro neniam malaperos el la bonaj koroj.

I. G. B.

(1) Fama brazila verso por difini homan vivon plenan je sufero, sed vere utila. — Tradukinto.

(2) "La vortoj estas kreitaj por kaŝi la penson". — Tradukinto.

## MUSA INFANTIL

(Ā menina Iracema Nogueira Coutinho, socia fundadora da Associação Potiguar de Esperanto, no dia de seu 8º aniversário natalício, 26-10-1940.)

Faça-se a luz em meu ser,  
Para que eu sempre persista  
Na vontade de aprender  
E de ser esperantista.

Hei de ser, se Deus quiser,  
Estudiosa garanto,  
Pois meu sonho sosicler  
E' conhecer o Esperanto!

Língua de todos os povos  
Ha de ser, com perfeição;  
Unindo velhos e novos  
Na mais santa comunhão!

O meu peito de criança  
Hoje sente glórias mil,  
Por saber que já se estuda  
Esperanto no Brasil!...

Santos Filho.

## ENIGMA FAKO

### SILAB-ENIGMO N.º 1

AR BO DO DO EK EL ER FO FO  
IN IO IO KO KU LA LO LO MO NA  
NA NO NU OA OK OS PI PO PO RO  
ŜA SE SK SO SU SU TI TI TO  
TU ZO

Formu el la 40 silaboj supraj 20  
dusilabajn vortojn kun la jenaj signi-  
foj:

1. Graso. — 2. Skribilo. — 3. Pla-  
to. — 4. Skrapi kamparon. 5. Le-  
gomo. — 6. Malsano. — 7. Izola loko.  
— 8. Mitologia nomo. — 9. Monkvan-  
to. — 10. Ideala modelo. — 11. Me-  
lodio. — 12. Landparto. — 13. In-  
sekto. — 14. Mineralo. — 15. Ko-  
nusforma korbo. — 16. Glitilo. — 17.  
Estinta. — 18. Cifero. — 19. Mezu-  
runuo. — 20. Kalkeca substanco.

*Interesan proverbon formas la unu-  
aj literoj de la supraj vortoj.*

### LOGROGRIFO N.º 1

Metalo 17 9 8 7 15 19 2 6  
Besto 9 22 21 1 6  
Arbo 4 5 11 7 23 9 6  
Birdo 10 13 4 28 29 6  
Floro 7 2 6 14 23 4 6  
Arbo 18 29 9 27 26 6  
Senorname 24 3 12 20  
Greno 30 11 26 25 9 6  
Linio 12 15 17 7 11 10 16 6

Difino: Proverbo.

*Ni ricevas la solvojn ĝis la 31a de  
Marto nunjara. Al la tri unuaj sol-  
vintoj ni donacos librojn pri kaj en  
Esperanto.*

## MIAJ PROVERBOJ

Ĉiu sendita folio  
estu benata de Dio.

Por forigi ĉian puson  
ni bezonas Dian puŝon.

Ne ĉiam poeta verso  
ekvenas sen trinka verso.

Plaĉa estus ja la ŝpino  
se ne kurbus nin la spino.

Ne ĉiam la bona stelo  
nin helpas el ia ŝtelo.

Ne kreskas arbo sen ŝelo,  
sed vivas mulo sen ŝelo.

Ne ĉiam la ĉeno ŝtala  
nin ligos kiel best' stala.

Kiam korpo estas sata,  
tiam ĉio estas ŝata.

Ne ĉiam en bona ŝtato  
ni estas en bona stato.

Supreniru ĉian ŝtupon  
kaj ne timu baran ŝtupon.

Kiam finos nia tuso  
nin postlasis viva tuŝo.

Homoj agas ĉiam ĝuste,  
sed ne agas ĉiam juste.

La bonaj kaj pacaj sentoj  
ne mortos dum la jar-centoj.

Ĉiam aranco ŝatas  
ĉian bedaŭrindan muŝon,  
kaj ĉiam la kato satas  
ĉian malfeliĉan muson.

JOZEFO SCALENGHE.

*Via Accademia Albertina 42. Torino.  
Italujo.*

## DUMVIVAJ KOMENCANTOJ

Pri la komencantoj ni skribis sim-  
patiajn frazojn en la Marta numero de  
la Praktiko. Ni diris, ke ni amas ilin,  
ke ni dorlotas ilin, ke ni donos al ili  
karesajn nomojn kaj ke ili ĝuas la  
privilegion balbuti en nia lingvo.

Hodiaŭ ni devas reveni al tiu temo.  
La kaŭzo estas tio, ke multaj samidea-  
noj miskomprenas nian simpation al  
la komencantoj. Ili opinias, ke ni vo-  
las havi en Esperantujo nur komencan-  
tojn. Tial ili ne klopodas progresi kaj  
perfektiĝi. Ili scias la dek-ses regulojn  
de la gramatiko kaj povas balbuti kel-  
kajn primitivajn esprimojn.

Efektive, ne malofte okazas, ke ni  
renkontas samideanon, kiu eĉ post dek  
aŭ dudek jaroj diras: "Bonvolu paro-  
li malrapide, ĉar mi estas komencan-  
to". Tiuj personoj estas la "eternaj  
komencantoj".

Ne estas granda gloro aparteni al  
tiu kasto. La publiko rapide konklud-  
as, ke ili ne havas talenton lerni la  
facilan Esperanton. Tial devas esti in-  
tereso de ĉiu komencanto, rapide per-  
fektigi.

Sed povas esti pli malbona sekvo. La  
publiko, kiu longe observas tiujn dum-  
vivajn komencantojn, facile faras mal-  
favoran konkludon pri nia lingvo mem.  
Vidante, ke personoj dum pluraj jaroj  
ne sukcesis bone ellerni la lingvon, oni  
konkludas, ke Esperanto estas tro mal-  
facila, nelernebla, ne parolebla lingvo.  
Kaj tian lingvon neniu volas enkon-  
duki en la internacian vivon.

Tiamaniere la "dumvivaj komencan-  
toj" povas esti tre danĝeraj kaj mal-  
utilaj al nia movado.

La plej bona propagando por nia  
lingvo estas paroli la lingvon. Kaj la  
plej efika malpropagando estas: paro-  
li ĝin malbone antaŭ la ne-esperanta  
publiko.

Teruran sperton ni havis foje. En  
tramvagono kelkaj Esperantistoj pa-  
rolis inter si. En momento unu el la  
ne-esperantistaj pasaĝeroj demandas al  
nia kunulo:

— Kiun lingvon parolas tiuj homoj?  
— Esperanton, — respondis la alia.  
— De kie vi scias?  
— Ĉar ili balbutas.

Nu, ĉu nia kara lingvo estas *balbut-  
lingvo*?

Jen, kiam "servon" povas fari al nia  
movado la senpripensaj komencantoj.  
Tial oni memoru: ni amas la komen-  
cantojn, sed nur dum unu jaro. En la  
dua jaro ili devas jam bone paroli  
sian lingvon.

Kaj la sekto de la "dumvivaj kom-  
mencantoj" devas malaperi. Rapide,  
rapide!

(El "La Praktiko", eldonata de "In-  
ternacia Cseh-Instituto de Esperanto",  
Junio 1932).

## BRAZILA REVUO DE GEOGRAFIO

"Revista Brasileira de Geografia"  
(Brazila Revuo de Geografio), oficia-  
la organo de la *Nacia Konsilantaro  
de Geografio*, fako de la *Brazila Insti-  
tuto de Geografio kaj Statistiko*, re-  
gistrara departemento. N.º 4 de la Dua  
Jaro — Oktobro 1940, kun 726 pa-  
ĝoj. Ĝi enhavas tri ĉefartikolojn kun  
resumoj en 5 naciaj lingvoj kaj en  
Esperanto. Jen la titoloj de tiuj ar-  
tikoloj: La Geografio kaj ĝia influo  
sur la Urbanismo", "Patagonio vidata  
de brazilano" kaj "Geografio de la  
transportoj en Brazilo".

Bonvolu legi la anoncon pri tiu Re-  
vuo sur alia paĝo de nia gazeto.

## JARLIBRO DE IEL

Jam aperis la JARLIBRO de la  
INTERNACIA ESPERANTO-LIGO  
— 1940 — Dua parto. *Nur por uzo  
de membroj.*

Ĝia enhavo konsistas el: Antaŭpa-  
rolo de A. C. Oliver; "Mil semoj  
perdiĝas", de C. C. Goldsmith; Koti-  
zoj — 1941; Aldonoj kaj Ŝanĝoj kaj  
"Armea Terminaro", de E. D. Dur-  
rant.

Aliĝu al BLE kaj IEL, almenaŭ  
kiel MJ, kaj vi ricevos la JARLI-  
BRON.

# BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS. *Manaus.* — “União Portuguesa” publikigis artikolon de s-ro Sebastião Augusto pri la filmo “Idiot's Delight”.

CEARÁ. *Fortaleza.* — La “Gimnazio Sankta Johano”, direktata de prof. Odilon Braveza, ĵus faris honorigon al la Paco inter la Nacioj elektinte la helplingvon Esperanto por la redaktado de la surskribaĵo de l' diplomiga bildo rilata al la jaro 1940a. La bildo estas artpentrita de la konata pentristino s-ino Maria Laura Teixeira Mendes. La skribaĵo konsistas el la jena frazo en Esperanto: “Tiel oni iras stelon”, responda al la latina: Sic igitur ad astre”. La ĵurnalo “O Povo” aperigis, sub sugesta titolo *Venka de Esperanto* interesan raporton pri tio. Al s-ro prof. Odilon Braveza niajn korajn dankojn.

Ankaŭ la gazeto “O Nordeste” publikigis la tutan deziresprimon pri Esperanto aprobitan de la Dua Brazila Kongreso de la Katolikaj Ĵurnalistoj.

*Limoeiro.* — La “Grupo Esperantista de Limoeiro” aliĝis al BLE pere de sia prezidanto d-ro Deoclecio Lima Verde kaj de la jenaj geanoj: s-ino Judite Chaves Saraiva, d-ro Rui Soares kaj s-roj Manoel Negreiro Bessa kaj Odilon Odilio Silva. Dankon kaj deziron pri longedaŭra kaj fruktodona vivo. D-ro Lima Verde fariĝis delegito de IEL.

RIO-GRANDE-DO-NORTE. *Natal.* — Estis tre brila la kunsido, kiun prezidis d-ro Americo de Oliveira, reprezentanto de la ŝtatestro, por la ekposedo de la estraro de la “Esperanta Asocio de Rio-Grande-do-Norte”. Sidis ĉe la prezidanteca tablo Pastro José Avelino, episkopa reprezentanto, leŭtenanto José Maria Pinto, reprezentanto de la haven-kapitano, kaj s-ro Jacinto Tavares, komandanto de la Polica Trupo, kies muzikistaro ludis ĉe la festo. Faris la oficialan paroladon s-ro Moacir S. Cunha, prez. de la Asocio.

La Asocio aliĝis al BLE pere de la jenaj anoj: s-roj Moacir S. Cunha, d-ro Luiz da Câmara Cascudo, Luiz M. Alves, Jerônimo dos Santos kaj d-ro Gentil Fernandes. Ni kore dankas kaj deziras, ke la Asocio konservu ĉiam vigla sian nunan entuziasmon



Unua Estraro de ESPERANTA ASOCIO DE RIO-GRANDE-DO-NORTE. — Fondita en la 28-IX-1940.

De maldekstre dekstren: Moacir S. Cunha — prezidanto; Arlindo Castor de Lima — unua sekretario; Luiz M. Alves — ĝenerala sekretario; Edith Câmara — bibliotekistino; Anibal Calmon Costa — kasisto; José Alcântara Barbosa — dua sekretario; Raul Lemos — direktoro de la “Departamento de Kulturo”.

por Esperanto. La Asocio starigis Kulturajn Departementon, kiu konsistas el la jenaj personoj: s-ro Raul Lemos, estro, prof. Paulo de Oliveira kaj Paulo Gois. Estas aklamitaj honoraj asocianoj s-roj d-ro Luiz da Câmara Cascudo, Ismael Gomes Braga, ing. Alberto Couto Fernandes, d-ro Gentil Fernandes kaj Targino Soares, kiu loĝas en Mossoró. Apartenas ankaŭ al la Honora Kadro la prezidanto de la “Asocio de Instruistoj”, kiu nun estas d-ro Luiz Antonio dos Santos Lima.

La Asocio festis la naskiĝan datrevenon de d-ro Zamenhof per speciala kunsido, kiun prezidis la malnova esperantisto d-ro Aderbal de Figueiredo, ekslernanto de la karmemora apostolo de la esperantista afero en Ŝtato Sergipe, D-ro Alcebiades Pais. S-ro Moacir S. Cunha, prez. de la Asocio, legis salutajn leterojn de s-ro Ismael Braga, titolitan “La granda sonĝo de l' Homaro”. Faris la oficialan paroladon d-ro Gentil Fernandes, kiu por tiu celo venis speciale el Areia Branca, kie li loĝas. Lia parolado, kiu estis varme aplaudita, finiĝis per la belega poezio de Zamenhof “Preĝo sub la verda standardo”. Per kuraĝigaj vortoj al la novaj esperantistoj la prezidanto fermis la kunsidon.

La 16an de Decembro d-ro Gentil

Fernandes inaŭguris la kurson de Esperanto, kiun direktas s-ro Moacir S. Cunha. Revenis el Rio-de-Janeiro, kie li subskribis la deziresprimon por Esperanto aprobitan de la Dua Kongreso de la Katolikaj Ĵurnalistoj, la klera ĵurnalista d-ro Ulisses de Gois.

Por la Ŝtata Filatelio Ekspozicio organizata de Pastro João da Mota kaj marleŭtenanto José Maria Pinto la estraro de BLE sendis kolekton da poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj, laŭ peto de s-ro Moacir S. Cunha.

Ĉe la loka gazetaro, kiu sin montras tre simpatia al Esperanto, aperis deversaj notoj kaj artikoloj pri ĝi, preskaŭ ĉiuj verkitaj de s-ro Moacir S. Cunha, el kiuj ni citas la jenajn: “Esperanto kaj la naciaj lingvoj”, “Esperanto kaj la religioj”, “O Esperanto”, de Maranhão, aperintaj en “O Diário”; “Naskiĝa Datreveno de Zamenhof”, “Zamenhof”, kaj “La unua paĝo de Zamenhof”, aperintaj en “A República”; “La Juneco kaj Esperanto”, aperinta en “A Voz da Caserna”. “A Ordem” publikigis la bonvenan telegramon senditan de la Asocio al s-ro prof. Ulisses de Gois.

Emeritiĝis s-ro João Pereira Siqueira, telegrafisto, kiu antaŭ nelonge bonan propagandon por Esperanto

faris en Natal, kie nun li denove lo-  
gas.

*Assú.* — Dank' al la ĝentileco de s-ro Palmerio Amorim, unu el la direktoroj de la gazeto "Assú-Jornal", tiu ĉi publikigis kelkajn artikolojn pri Esperanto verkitajn de s-ro Moacir.

**PERNAMBUCO.** *Recife.* — La "Pernambuka Esperanto-Asocio" daŭrigas sian viglan propagandon pere de kursoj (en sia sidejo kaj en la Asocio de Komercoficistoj kaj per la mikrofono de la "Radio Klubo de Pernambuco") kaj, precipe, pere de la eldonado de la tutregule aperanta gazeto "Pernambuco Esperantista". Post la apero de nia antaŭa numero ni ricevis ĝiajn 10an, 11an kaj 12an numerojn, kiuj enhavas sur siaj unuaj paĝoj interesejn artikolojn de Ismael Braga, kaj en la aliaj gramatikajn lecionojn, informojn pri la Esperanto-movado, pecojn de romano verkita de s-ro I. Quinaud kaj, sub la titolo "Esperanto-Modelo", klasikan literaturon. Meritas la laŭdojn de la brazila esperantistaro ĝia redaktoro, f-ino Artemisa de Araujo, kaj ties kunhelpantoj.

La revuo "Presente de Natal" publikigis artikolon pri la karmemora propagandisto Odilon de Araujo kaj ties portreton.

*Garanhuns.* — La tiea grupo festis, je la 12a de Oktobro, la duan datrevenon de sia fondo, pri kiu f-ino Carmosina Monteiro publikigis en la gazeto "O Monitor" interesas artikolon. Ĝi ankaŭ aperigis aliajn artikolojn ŝiajn kaj komencis la publikigon de informoj pri la Esperanto-movado, sub la titolo "Tra la esperantista mondo", kiujn verkas f-ino Maria do Socorro Monteiro, prezidantino de la grupo.

**BAÍA.** *Salvador.* — La "Esperanta Grupo de Baía" malfermis novan kurson ĉe la salono de la "Asocio de Komercoficistoj". Ĝi eldonis interesan poŝtkarton kun samkoloraj reproduktajoj de la kvar poŝtmarkoj eldonitaj de la brazila Poŝto kun teksto en Esperanto, per kiu ĝi deziras Feliĉan Novjaron al la adresitoj. La ĵurnalo "Estado da Baía" reproduktis tiun poŝtkarton dirante, ke ĝi estis la plej interesa, el ĉiuj ricevitaj.

**STATO RIO.** *Niteroi.* — Aliĝis al niaj Ligoj, kiel MJ kaj fariĝis delegito por Statistiko kaj Katolikaj Aferoj d-ro Mario Ritter Nunes, advokato, kiu estas komisiita de d-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko", por la esperanta redaktado de ĝia korespondado eksterlanden. D-ro Mario Nunes, kiu ĵus ricevis la "Ateston pri Lernado", baldaŭ

malfermos kurson ĉe la "Faculdade Fluminense de Comércio".

**SÃO PAULO.** *São Paulo.* — La loka grupo daŭrigis, kun admirinda reguleco, la ĉiutagan disradiadon de la esperanta horkvarono pere de la stacio de "Rádio Piratininga" (PRH-3), kiu okazas de la 8.45a ĝis la 9 horo. Speciala disradiado okazis la 15an de Decembro por festi la 81-an naskiĝan datrevenon de Zamenhof. En tiu disradiado, kiu daŭris unu horon, kaj konsistis el kantoj, muzikoj kaj deklamadoj, partoprenis geanoj de tiu klubo.

Aliĝis al niaj Ligoj s-roj Otto Kühne, kiel MA, kaj Mario Franzolim, kiel AM, ambaŭ anoj de *São Paulo Esperanta Klubo*.

Vizitis la sidejon de la klubo f-inoj Maria kaj Rosa Amaral Malheiro, aninoj de BKE.

*Santos.* — Funkciis regule la kurso antaŭ nelonge inaŭgurita en la sidejo de la loka grupo.

**SANTA CATARINA.** *Florianópolis.* — Aliĝis al niaj Ligoj kaj fariĝis loka delegito kaj ankaŭ fakdelegito por statistiko, muziko kaj katolikaj aferoj s-ro Giovanni P. Faraco, kiu daŭrigis sian kurson kaj klopodadas por fondi esperantistan grupon.

**MINAS GERAIS.** *Juiz-de-Fora.* — Neniun informon pri la tiea Esperanto-movado ni ricevis de la tri grupoj fonditaj dum la ĵus pasinta jaro. Nur en "Diário Mercantil" ni legis, ke la estraro de la "Grupo Esperantista Abel Gomes" konsistas el la jenaj personoj: S-roj Osorio Pacheco — prez., Isaltino da Silveira Filho — sek., Othon Reis — kas. kaj José Oliveira — bibliotekisto.

*Araguari.* — La tiea grupo jam pagis sian nunjaran kotizon.

*Ouro Preto.* — Aliĝis kiel simpla membro Germano Frederico Schimming kaj kiel AM s-ro Geraldo Barbosa Mamede, kiu fariĝis loka delegito. Ambaŭ estas studentoj.

*São Sebastião do Paraíso.* — La loka grupo aliĝis al niaj Ligoj pere de la jenaj anoj: s-roj prof. Nestor Lacerda — prez., Vicente de Paula Araujo — vicprez., Luiz Anacleto de Silos — unua sek., Pindora de Carvalho kaj Braz Calafiori Neto.

La ĵurnalo "O Liberal" publikigis grandan nombron da interesaj artikoloj verkitaj de s-ro Luiz A. de Silos, el kiuj ni citas kelkajn, kies titoloj estas: Esperanto en Hollywood", Esperanto kaj Katolikismo", "Esperanto kaj Filatelio", "Lerta Vortareto" kaj "Morto de paralizia verkisto", en kiu li parolas kun saŭdado pri la klera instruisto Antonio Roque Martins, en

kies domo okazis la fonda kunsido de la grupo kaj la unuaj kursaj lecionoj. Li ankaŭ aperigis en la sama ĵurnalo portugaliajn tradukojn de eksterlandaj verketoj aperintaj en gazetoj esperantistaj.

*S. Manoel.* — Ni legis en "Reformador", ke fondiĝis "Grupo Esperantista de Urbo S. Manoel", kies estraro konsistas el la jenaj sinjoroj: Roldão de Moraes Secunho — prez., Pamfilo Nogueira de Matos — unua sek., Antonio Soares Ramo — dua sek., Boanerges Vieira Folly — unua kas. kaj Reclínio Pires Teixeira — dua kassisto. La grupo funkcias en la sidejo de la Spiritista Centro "Lumo sur la Vojo".

**RIO-DE-JANEIRO.** — Finiĝis la kurso, kiun direktis ĉe la sidejo de la Societo de Geografio s-ro A. Couto Fernandes. Je la 8a de Februaro, sub la prezido de s-ro ing. Hernani Mota Mendes, prez. de "Brazila Klubo Esperanto", okazis ekzameno en kiu partoprenis sep lernintoj kaj unu perkoresponda lerninto. Ĉiuj estas aprobitaj kaj ricevis la Ateston pri Lernado. Jen iliaj nomoj: s-roj Aldino de Freitas, Sílio Vaz, d-ro Mario Ritter Nunes, Diderot Freitas, José Griner, Nelson Ferreira da Silva, Aron Viktor Zoladz kaj Octaviano da Silva Lopes. Ilin ekzamenis la instruisto kaj d-ro Carlos Domingues.

Sub la prezido de sia prezidanto, d-ro Guilhon Ribeiro, la "Brazila Spiritista Federacio" festis la 81an naskiĝan datrevenon de d-ro Zamenhof per solena kunsido, kiun ĉeestis multego da personoj. La prez. klarigis la ĉeestantaron pri la kaŭzo de la honoro farata al tiu superhomo. Faris la oficialan paroladon s-ro Ismael Braga, direktoro de la propagando de Esperanto ĉe la Federacio, kiu estas varme aplaŭdita.

Akompanata de s-ro Octaviano da Silva Lopes, gvidanto de kurso farata ĉe la sidejo de "Grupo Esperantista Bezerra de Menezes", kvar geknaboj vizitis du spiritistajn centrojn, kie ili deklamis poeziojn en Esperanto.

En la monato Decembro aperis la unua numero de la "Revuo pri Edukado kontraŭ Brulado", kies direktoro estas s-ro Olavo C. Guimarães. Ĝi publikigis paĝon em Esperanto klarigantan pri la organizo de la Fajrestingista Korpuso de Rio-de-Janeiro. Piede de tiu paĝo troviĝas la jena noto: "Bonvolu sendi sciigojn, fotografajojn, rilatajn al la Fajrestigistoj de via lando, kies sendadon ni kore antaŭdankas".

"Jornal do Comércio", "Diario de Notícias" kaj aliaj aperigis notojn pri

**EL S V E D U J O**

**La "Novo Mondo" volas savi Esperanton**

Ne nur sur la politika kampo la Norda kaj Suda Amerikoj serĉas vojon al plia intimeco. La vivarto aplikita nun en Eŭropo rezultis, ke ankaŭ la esperantistoj sur la okcidenta hemisfero emas ion entrepreni por savi kaj fortigi la situacion de Esperanto sur ilia teritorio. Kiel signo de tiu klopodo valoras memorigi pri ĵusa decido de Brazila Ligo Esperantista. Laŭ propono de Esperanto Association of North America kaj The Canadian Esp. Association la Brazila Ligo prenis sur sin la taskon eldoni dufoje jare specialan gazeton titolitan Tutamerika Numero de amerikaj esperantistoj.

Tiu gazeto, kiu en la apermonatoj anstataŭos la landajn organojn, havos kiel ĉefan taskon pioniri por pli unueca kaj praktika laboro por la esperantoafero sur la vastega amerika kontinento.

(El la Majo-Aŭgusta numero de "Nia Parolilo" kies nuna adreso estas: Linnégatan 38, GÖTEBORG. Svedujo.)

De S-ro Erik Ekstrom, vicdelegito de IEL en Goteborg, Svedujo, ni ricevis la jenan poŝtkarton:

Estimataj sinjoroj! Per la lastaj numeroj jan.-feb. kaj marto-aprilo, de via escepte bona gazeto *O Brasil Esperantista* oni klare vidas, ke la esperantistoj en la t. n. "Nova Mondo", precipe Brazilo, estas pretaj dum la nuna por Eŭropo malfacila tempo pli aktive ol iam teni kaj blovi vivon en nia kun tiom da fervoro kaj entuziasmo elkonstruita Esperanto-Movado. Vi sciŭ, estimataj s-anoj, ke via sinteno ĉi-rilate plenigas la bruston de miloj da esperantistoj per nova espero kaj fido pri la estonto.

Do, mian sinceran bondeziron por via valora kaj nobla laboro! Altestime  
*Erik Ekstrom.*

Esperanto. Interesa artikolo de generalo Bertoldo Klinger titolita "Ortografio, Pozitivismo kaj Esperanto" aperis en la ĵurnalo "Diário de Notícias". Li estas aŭtoro de la libro "La Brazila simpligita ortografio" kaj en sia artikolo li diras, ke multaj esperantistoj sin montris simpatia al sia sistemo. Pri tiu libro Ismael Braga skribis en "Reformador" tre interesan artikolon. "BLE" dankis al s-ro Gen. Klinger la ekzempleron, kiun li ĝentile donacis al ĝi. Artikoloj pri Esperanto

**BRAZILA LIGO ESPERANTISTA**  
BALANCETE REFERENTE AO ANO DE 1940

	Receita	Despesa
Saldo de 1940 . . . . .	139\$570	
Subvenções recebidas do Ministério da Educação referentes aos anos de 1939 e 1940 . . . . .	9:990\$000	
Quotas de sócios . . . . .	2:622\$100	
Venda de livros e percentagens . . . . .	139\$300	
Assinaturas de jornais e revistas, exemplares avulsos e anúncios . . . . .	681\$100	
Traduções para o Esperanto feitas pelo presidente da Liga Esperantista . . . . .	410\$000	
"Atestoj pri Lernado" (Atestados de Estudo) . . . . .	38\$000	
Curso por correspondência . . . . .	40\$000	
Extorno de lançamentos feitos por antecipação . . . . .	2:216\$800	
Impressões de "O Brasil Esperantista" e outras impressões . . . . .		8:243\$500
Pagamento à "Internacia Esperanto-Ligo", em Londres, por quotas de sócios . . . . .		1:725\$800
Aquisições de livros, quadros murais e encadernações . . . . .		849\$000
Pagamento feito por direitos autorais . . . . .		500\$000
Assinaturas de jornais e revistas e anúncios . . . . .		179\$000
Material de expediente . . . . .		525\$600
Adesão a Congresso . . . . .		25\$000
Indenizações à Sociedade de Geografia por serviços de telefone e seguro contra fogo . . . . .		146\$000
Selos do correio, estampilhas e telegramas . . . . .		629\$850
Homenagem póstuma . . . . .		100\$000
Vencimentos . . . . .		1:400\$000
Aquisição de moveis . . . . .		1:270\$000
Legalização da Liga Esperantista e certidões . . . . .		294\$400
Expedição e despesas miudas . . . . .		54\$000
Saldo para 1941 . . . . .		334\$720
	16:276\$870	16:276\$870

Rio-de-Janeiro, 8 de Fevereiro de 1941.

*Odillo Pinto.*  
Tesoureiro

**BRAZILA LIGO ESPERANTISTA**

Dum la jaro 1940 pagis siajn kotizojn al BLE kaj IEL, pere de la grupoj aliĝintaj aŭ izole:

	Geanoj
"Brazila Klubo Esperanto" . . . . .	52
"Pernambuka Esperanto-Asocio" . . . . .	15
"São Paulo Esperanta Klubo" . . . . .	8
"Centro Esperantista de Santos" . . . . .	5
"G. Esperantista de Araguari" . . . . .	5
"Esperanta Grupo de Baía" . . . . .	4
"Esperanto-Klubo de Alagoinhas" . . . . .	4
"Esp.-Klubo de Santo Amaro" . . . . .	3
"G. Esp. Ismael Gomes Braga" . . . . .	3
"Katolika Esperantistina Klubo" . . . . .	3
"Sudbrazila Esperantistigilo" . . . . .	2
Izolitaĵoj . . . . .	13
	135

Ne pagis siajn 1940ajn kotizojn la anoj de "Grupo Esperantista de Monte Aprazivel" kaj "Societo Esperantis-

verkitaj de Ismael Braga kaj notoj pri la Esperanto-movado aperis en la Decembra kaj Januara numeroj de "Reformador".

ta KONKORDO". Estas konsilinde, ke la grupoj pligrandigu la nombron de siaj anoj aliĝintaj al BLE kaj IEL, se ili ne povas imiti la ekzemplon de "Brazila Klubo Esperanto", kies ĉiuj anoj estas membroj de la nacia kaj internacia Ligoj.

**KORESPONDADO**

S-RO ARMANDO CAMBRIAGHI — Rua Alabastro, 447. São Paulo. Brasil. — deziras korespondadi kun ĉiulandaj esperantistoj pri diversaj temoj.

S-ANO GEORGO COBLE, 174. Westwood, N. J., U. S. A., mezaĝa kinea projekciisto, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe kun Brazilanoj pri diversaj temoj. Certe respondos.

S-RO GIOVANNI P. FARACO — Departamento Estadual de Estatística. Florianópolis. Santa Catarina. Brasil — deziras korespondi kun fremdaj kaj naciaj samideanoj pri muzikteorio, statistiko, latinaj klasikaj aŭtoroj, lernobjektoj de fundamenta gimnazia kurso kaj katolikaj aferoj.

## BONVOLU PAGI VIAN NUN- JARAN KOTIZON

### NOVAJ LIBROJ

Daŭrigante siajn eldonojn de esperantaj lernolibroj la "Eldona Librejo de la Federacio" — Av. Passos, 30. Rio-de-Janeiro — aperigis dum la monato Januaro la jenajn librojn:

"O Evangelho segundo S. João, en Esperanto kaj portugala lingvo. 2.000 ekz.

"Curso pela Bíblia". 10.000 ekz.

"Guia de Conversação — português Esperanto", kompilita de Ismael Gomes Braga. 3.000 ekz.

Krom tiuj libroj ĝi eldonis 28.000 ekz. de ĝenerala katalogo de la libroj vendataj de sia librejo, en kiu estas granda nombro da esperantaj libroj.

Estas tre admirinda la laboro de la Federacio pri la eldonado de esperantaj libroj, tio, kio multe helpas la propagandon de Esperanto tra la tuta Brazilo.

Nun ĝi preparas la eldonon de nova "Vortaro Esperanta-portugala", kompilita de s-roj A. Couto Fernandes kaj d-ro Carlos Domingues.

### O EVANGELHO

Segundo São João

### O SERMÃO DA MONTANHA

Segundo São Mateus

Em Esperanto e Português

*La Evangelio laŭ Sankta Johano kaj la prediko sur la Monto laŭ Sankta Mateo en Esperanta kaj Portugala Lingvoj.*

Livraria da Federação E. Brasileira

Av. Passos, 30. Rio-de-Janeiro

Preço: 4\$000

## REVISTA BRASILEIRA DE GEOGRAFIA

(Brazilia Geografia Revuo)

Trimonata publikigaĵo kun resumo en Esperanto de la ĉefaj artikoloj. Eldonita de la *Nacia Konsilantaro de Geografio*, fako de la *Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko*.

Jam aperis ok numeroj.

Ĉiu numero: 6\$000 aŭ 5 poŝtaj respondkuponoj.

Jarabono: Unu dolaro kaj duono aŭ 20 poŝtaj respondkuponoj

Adreso: Avenida Augusto Severo, 4

RIO DE JANEIRO. BRASIL

## REVUO PRI EDUKADO KONTRAŬ BRULADO

Redaktoro-direktoro

OLAVO C. GUIMARÃES

*Teknika ĉiumonata Revuo por Fajrestingistoj kaj pri popola edukado kontraŭ brulado kaj aliaj akcidentoj.*

Adreso por la korespondado:

Estrada de Sta. Cruz, 3181

Rio de Janeiro — Brasil (S.A.)

Jarabono: Eksterlande — 30\$000, per poŝtmandato aŭ registrita letero.

Ĝi enhavas paĝon redaktitan en Esperanto.

## Guia de Conversação Português Esperanto

### e Correspondência Comercial

Compilado por Ismael Gomes Braga

Editado pela LIVRARIA EDITORA DA FEDERAÇÃO E. BRASILEIRA — Av. Passos, 30. Rio-de-Janeiro. — Preço: 4\$000.

Livro indispensavel a todo esperantista que deseja aperfeiçoar-se na conversação e correspondência com *sami-deanos* estrangeiros.

## Livros Sobre Esperanto

Editados pela LIVRARIA DA FEDERAÇÃO E. BRASILEIRA, à Av. Passos, 30. Rio-de-Janeiro, recebemos os seguintes livros:

O EVANGELHO segundo São João e SERMÃO DA MONTANHA, segundo São Mateus. Em Esperanto e português — Preço: 4\$000.

CURSO DE ESPERANTO pela Bíblia. Distribuição gratuita.

GUIA DE CONVERSÇÃO PORTUGUÊS-ESPERANTO e CORRESPONDÊNCIA COMERCIAL, compilado por Ismael Gomes Braga. — Preço: 4\$000.

## Grupoj Aligintaj al B. L. E.

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO". (1906). Sidejo: *Praça da República*, 54. Rio-de-Janeiro.

SUDBRAZILA ESPERANTISTIGILO. (1927). Sidejo: *Rua dos Andradas*, 1431. Porto Alegre. Rio Grande do Sul.

CENTRO ESPERANTISTA DE SANTOS. (1932). Sidejo: *Rua Baía*, 57. Santos. Est. São Paulo.

ESPERANTA GRUPO DE BAÍA. (1936). Sidejo: *Rua Bangala*, 18. Salvador. Baía.

S. PAŬLO ESPERANTA KLUBO. (1937). Sidejo: *Rua 7 de Abril*, 176, 3.º — sala 34. São Paulo.

PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCIO. (1937). Sidejo: *Rua do Principe*, 398. Recife. Pernambuco.

ESPERANTO - KLUBO DE SANTO AMARO. (1937). Sidejo: *Av. Viana Bandeira*, 14. Santo Amaro, Baía.

GRUPO ESPERANTISTA "ISMAEL GOMES BRAGA". (1938). Sidejo: *Praça D. Moura*, 334. Garanhuns, Pernambuco.

SOCIETO ESPERANTISTA "KONKORDO" (1939). Sidejo: *Praça 11 de Junho*, 49. Rio-de-Janeiro.

GRUPO ESPERANTISTA DE ARAGUARI. (1939). Adreso: Caixa postal 73. Araguari. Minas Gerais.

KATOLIKA ESPERANTISTINA KLUBO. (1939). Sidejo: *Rua Benfca*, 2457. Fortaleza. Ceará.

ESPERANTO-KLUBO DE ALAGOINHAS. (1940). Sidejo: *Rua 24 de Outubro*, 12. Alagoinhas. Baía.

"CARLO BOURLET" ESPERANTO-GRUPO. (1940). Adreso: Caixa postal, 94. S. Sebastião do Paraíso, Minas Gerais.

ESPERANTA ASOCIO DE RIOGRANDE-DO-NORTE. (1940). Sidejo: *Rua Vigário Bartolomeu*, n.º 587. Natal. Rio-Grande-do-Norte. — Adreso por korespondado: *Av. Tavares de Lira*, 105.

GRUPO ESPERANTISTA DE LIMOEIRO. (1940). Adreso: Caixa postal, 73. Limoeiro. Ceará.

## ESPERANTO

### Série Pedro II Coleção "B"

CADERNO CONTENDO

Gravuras e Vocabulários para o ensino do Esperanto pelo Método Direto

(Tradução do vocabulário por A. Couto Fernandes)

PREÇO 3\$000